

RAPORTO DE MAZINGIRA DE OKTOBRO 2012 GHIS SEPTEMBRO 2013

Dato: La 2-a de Oktobro 2013

Karaj Estimataj Samideanoj,

En chi tiu jaro okazis grava diskuto en mia lando pri verkado de nova konstitucio de la lando kiu anstatauos la nunan, kiu aghas nun chirkau 50 jarojn, la procezo pri verkado de la nova konstitucio est/is/as far/ita/ata de 30 delegitoj kiuj estis nomumitaj de la prezidanto de la Unuighintaj Respublikoj de Tanzanio; 15 venas de Zanzibaro kaj 15 venas el Tanganjiko. La proponita konstitucio estis vaste diskutita de la civitanoj kaj poste de la parlamentanoj. Dum la debato kelkaj parlamentanoj de opoziciaj partioj kritikis ghin, kaj ili ne partoprenis dum la lasta debato en kiu la parlamentanoj balotis por pasigi ghin, tiel la parlamentanoj kiuj apartenas al la registara partio akceptis ghin kaj ghi nun atendas la subskribon de la prezidanto; poste ghi revenos al la civitanoj por baloti, chu ili akceptos ghin.

La plej grava punkto en tio konstitucio kiun oni multe pri debat/is/as estas la fondado de tri registaroj, kiuj estos: 1. La registaro de Unuighintaj Respubliko de Tanzanio, 2. La registaro de Zanzibaro, kaj 3. La registaro de Tanzanio Cheftero. Multaj homoj deziris scii pri la limigo au la kapablo de la tri autoritatoj sen tushi la rajton de chiu partoprenanto en tiu unuigo...

En mia region la vetero estas bona sed tro multe da suno dum somero; nun komencighas mallonga pluv-sezono, kaj la kamparanoj okupighas pri terkultivado por tiu chi mallonga pluv-sezono en kiu oni semas, kun granda espero havi bonan rikolton en Januaro kaj Februaro 2014.

Karaj Estimataj Samideanoj.

Jen la raporto pri Mazingira Salama & Ketare dum la periodo de Oktobro 2012 ghis Septembro 2013, kaj mi elkore invitas vin legi ĝin kun mia granda espero ke vi poste daurigos vian subtenon al Mazingira. Kaj mi kore salutas vin kaj deziras al vi ĉion bonan kaj plenan ghojon por la venonta jaro 2014.

Mi tutkore sendas al vi chiujn miajn elkorajn dankojn al chiuj kiuj subtenis al Mazingira en la jaro 2013 kvankam la nombro de subtenantoj malkreskas de jaro post jaro, tio okazas eble char kelkaj subtenantoj libervole chesigis iliajn subtenon al Mazingira au ili maljunighis kaj ne plu povus daurigi iliajn subtenon pere de iliaj malgranda pensio,

Pro tio Mazingir-anoj pridiskutis tion kaj venis du ideoj:

1. Varbi novajn subtenantojn,
2. Mazingira starigu daurigeblan projekton por enspezi monon por subteni la projektojn. Ni decidis starigi agrikulturan projekton en kiu Mazingira deziras kultivi la kampojn pri Sunfloro kaj Maizo kiuj bone kreskas en nia regiono, kaj ankau premi sunfloro-semojn por havi oleon kiun ni vendos kaj gajnos monon por mem financi la projektojn.

Mi elkore sendas miajn dank-esprimojn al chiuj kiuj subtenis al Mazingira kelkaj de ili estas:

- Geavoj de S-ro Bart Demeyere kolektis monon dum ili festis 75 jarojn de ilia edzigho por subteni la konstruadon de la tegmento de la tri klas-chambroj en la Esperanto Mez-lernejo
- Manfred Westermayer, Ute Haas kaj aliaj AVE-anoj por la oleopremilo kaj biogas-kurso.
- Leendert Hordiyk kaj Peter Kuehnel kontribuis por la oleopremilo.
- La Sveda Esperanto Federacio kiu subtenis la Radio projekton.
- S-ro Hans Bakker achetis 2 malgrandajn oleopremilojn kiuj funkcias per manoj; ni uzas ilin por instrui kultivistojn en diversaj vilaghoj.
- Christiana Lamy kaj Maurice Foucher helpis por operacio kaj elektra energio.
- Franca asocio Solidareco Afriko-Azio kiu subtenis konstruon de pliaj 9 putoj.
- Multaj aliaj subtenantoj helpis al orfoj, putoj kaj konstrumaterialo por la lernejo.
- La distrikto kaj parlamentano de Bunda achetis cementon, k.t.p. kaj venigis pliajn instruistojn.
- La komunumo en la vilagharo Ketare kolektas lokajn materialojn por konstruado de lernejo.

Jen la raporto pri la projektoj faritaj en la periodo de Oktobro 2012 ghis Septembro 2013.

BIOGASO:

Mi partoprenis biogas-kurso che la Tanzania NRO "MAVUNO" kiu estas subtenata de la germana BayWa AG. Post la kurso mi ne povis labori pri tio projekto pro manko da mono. Chirkau 1000 Euroj ebligis min fari esplorojn kaj konstrui la biogas-metanigujon, mi petas viajn subtenojn en tiu projekto (germane): <http://www.baywastiftung.de/projekte/afrika-und-asien/biogas-tansania>

ARBARIGO:

En ĉi tiu jaro ni daŭrigis la projekton por pli planti la junajn arbetojn, la vetero estis kun multe da suno dum somero kiu kaŭzis malkreskon de multaj arbetoj.

Ni tamen kultivis 1000 arbidojn kiujn ni ekplantos en Decembro kaj Januaro 2014.

AGRIKULTURO:

Mazingira decidis starigi stabilan projekton pri agrikulturo en kiu kamparanoj kultivos la kampojn kaj semos Maizon por vendi kaj Sunfloron por premi oleon. Mazingira aĉetos sunfloro-semojn de lokaj kultivistoj por premi kaj ricevi oleon kiun ni vendos, kaj donos la enspezon al la Mazingira-projektoj.

Mazingira interkonsentis kun la distrikto de Bunda disvastigi la stabilan agrikulturon en Bunda distrikto, kiu estas la malriĉa distrikto en Tanzanio en kiu la enspezo de loĝantoj estas 25 dolar-cendoj tage.

La kultivistoj en 40 proksimaj vilaghoj kultivos Sunfloron kiel komerca produkto. Mazingira aĉetos ĉiujn semojn de sunfloroj je bona prezo kaj tio ebligas ilin eviti malriĉecon.

Mazingira premos la semojn por havi oleon, kiu bone vendighas en nia regiono.

Por ke tiu projekto estu sukcesa Mazingira bezonas sufiĉe bonan oleo-premilo-ekipajhon (diversaj iloj kaj la premilo mem) kiu kostas ch. 3000 Euroj.

La projekto komenciĝas en Oktobro 2013, kaj ghis nun Mazingira preparis jam 3000 broŝuretojn kiujn ni disdonos al la kultivistoj, kaj en multaj kunvenoj ni instruis la kultivadon de Sunfloroj. Ni esperas ke oni kultivos ĉirkaŭ 500 hektarojn da Sunfloroj; ni atendas 1 250 000 kilogramojn da kerno/semoj. El la oleo Mazingira atendas profiton inter 80 - 100 mil Euroj jare. Krome Mazingira bezonas mez-grandan traktoron de 25HP (cheval-povoj) por plugi la teron kaj transporti Maizon kaj Sunflorojn; ghi kostas ĉirkaŭ 4500 Euroj inkluzive da divers-specaj plugiloj kaj ĉareto. Se ne sufiĉas la mono, ni aĉetos 2 malgrandajn traktorojn je 3000 Euroj.

En nia regiono ĉiu kamparano havas propran terenon kiun li/shi heredis de gepatroj aŭ ricevus senpage de la vilagha konsilio. Mazingira same ricevis terenon de la vilagha konsilio; kaj eblas ricevi pli grandan terenon kondiĉe ke ni havas la laborfortojn. Tiel ni povus kultivi 25 ha da majzo kaj 25 ha da sunfloroj.

Se Mazingira posedas la traktoron, la kamparanoj rajtos lui la traktoron kun la traktoristo por plugi la teron kaj tiu kamparano pagos post la rikolto kaj vendo da grenoj/kernoj.

ELEKTRA ENERGIO:

Ni ankoraŭ ne sukcesis pri la energio-projekto en niaj vilaghoj; ge-sroj Maurice Foucher kaj Christiana Lamy serĉas asocion kiu pretas subteni ghin. Mi petis la ministron pri energio - li metis tion en la ŝtata buĝeto de 2013/14; do mi atendas la rezulton.

La sunpaneloj subtenitaj de la Esperanto grupo de Madrido al la dispensario de Marambeka vilagho ankoraŭ funkcias bone. Ghi vere faciligis la laboron tie dum la nokto pro la lumo.

Nuntempe multaj malsanuloj kaj gravedulinoj venas tie por ricevi kuracadon dum la nokto esperante ke estas lumo.

Alia bezono estas transportilo (ambulanco) por la dispensario por transporti malsanulojn aŭ gravedulinojn al la distrikta hospitalo kaj de vilaĝoj al la dispensario. Tiaj ambulancoj kostas 2500 Euroj - ni daŭre petas vian subtenon pri tio.

LA OPERACIO DE INFANOJ:

En ĉi tiu jaro nur unu infano ricevis subtenon: la 11 jara knabinon nome Susana Akweri kiu ricevis helpon de ge-roj Christiana Lamy kaj Maurice Foucher, la knabino ankoraŭ restas en hospitalo por la operacio kaj ŝi bone progresas post la unua operacio de la unua piedo kaj baldaŭ ricevos operacion de la dua piedo. Ŝin akompanos nun Tatu Sita.

Ĉar la infanoj bezonas akompananton, estas pli efike sendi ilin duope al la malsanulejo. Jam atendas, 11-jaragha Kabura JUMO, necesas rektigi ŝiajn krurojn, kaj tio kostus 400 Eurojn; malpli severa kazo bezonas nur 200. Eblas vidi la fotojn de kelkaj infanoj, kiuj atendas vian helpon:

www.verduloj.org/maz_operacio_kruroj.pdf

Se vi emas helpi infanon bonvolu kontakti Manfred Westermayer (Manfred@westermayer.de) kaj Christiane Lamy (lamy@cegetel.net); aŭ rekte al mi Mramba Simba (smbmramba@yahoo.com)

MIKROKREDITOJ:

La mikrokredito-projekto funkcias kvankam en ĉi tiu jaro estis multe da suno kiun okazis manko de rikolto tamen la ne okazis repago-problemoj ...

PUTOJ PROJEKTO:

Multan dankon al la franca asocio SOLIDARECO AFRIKO-AZIO, kiu subtenis la projekton per 7500 Euroj en la jaro 2013. Per tio monon ni konstruis chirkau 9 putojn kaj ghis nun ni sukcesis konstrui entute 44 putojn kaj restas 3 putojn pro kiuj ni ankoraŭ petas daŭrigi ilian subtenon kiel en la antaŭaj jaroj per 7500 Euroj kiun ni elspezos jene:

1. por la restintaj 3 putoj kiuj entute kostas chirkau 2500 Euroj.
2. Por akvo-rezervujo kiu povus konservi 25 000 litrojn da akvo che la Esperanto-mez-lernejo. En tiu lernejo la lernatoj kaj instruistoj soifas dum iliaj lerno-horoj pro manko da pura trink-akvo, (ni serĉis subteran akvon apud la lernejo sed ne sukcesis ĉar ĝi troviĝas profunde je 60 m). La distrikta inĝeniero pri akvo konsilis nin, konstrui pluv-akvo rezervujon en kiu kolektiĝos la pluv-akvo de la tegmento. Do ni deziras konstrui pluv-akvo rezervujon, kiu kolektos 25 000 litrojn kaj kostas ch 2000 Euroj.
3. Kaj 3000 Euroj ni elspezos por la aĉeto de mez-granda traktoreto se ni trovos plian 1500 Eurojn. Se ne, per 3000 Euroj de la franca asocio ni povos aĉeti 2 malgrandajn traktoretojn "Power Tiller" kiuj ankau taugas por nia agrikultura projekto.

Poste ni povus daŭrigi la put-konstruadon kaj konstruado de la malgrandaj surteraj lagetoj - por akvumi la kampojn, trinkakvo por bovoj kaj por bredi fishojn - en Salama kaj Ketare vilagharoj kaj en aliaj vilaĝoj en la distrikto de Bunda.

ORFOJ PROJEKTO:

En ĉi tiu jaro Mazingira subtenis al 418 orfoj, el kiu 96 orfoj ricevis helpon de subtenantoj el Germanio, Belgio kaj Nederlando kaj 322 orfoj ricevis hepon de subtenantoj el Francio per la franca asocio Solidareco Afriko-Azio, Bruno Robineau, Maryvonne kaj Boris Bouchez kiuj kolektis la monon de subtenantoj kaj sendis kune kun la subteno de Solidareco Afriko-Azio.

Ĉi jare multaj orfoj finis la baz-lernejajn studojn kaj ili ekstudos en la mez-lernejo ekde Januaro 2014 dank' al la mez-lernejo "Esperanto Secondary School" kiu havos lokon por 160 novaj lernantoj. Do mi petas al vi ĉiuj daŭrigi vian subtenon al la nun subtenataj orfoj kaj al pliaj, kiuj ne jam ricevis subtenanton.

Mi ankaŭ petas vian subtenon al la lernantoj ĉe Esperanto-mezlernejo kiuj vere deziras vian helpon pri lernopago kaj Esperanta T-ĉemizo, kiu ni aĉetas surloke je 3 eŭroj por ĉiu T-ĉemizo. Kaj la lernopago kun vestaĵoj por unu lernanto ĉe "Esperanto" mez-lernejo estas 50 eŭroj jare.

LERNEJO PROJEKTO:

Dank al geavoj de Bart kiuj helpis por konstruado de tri pliaj klasoj kiuj akceptos novajn lernantojn en Januaro 2014, nun la lernejo havas kompletajn 6 klas-chambrojn; ankoraŭ mankas necesejo por instruistoj, loghejoj por instruistoj, pluv-akvo rezervujo, laboratorio kaj pliaj klasejoj por la jaro 2015.

Mi esperas ke vi ĉiuj ankoraŭ daŭrigos viajn subtenon por la projekto lernejo.

RADIO PROJEKTO:

Progresas bone la radio projekto, dank al Sveda Esperanto Federacio kiu subtenis la projekton per 250 Euroj kiu ebligis nin aĉeti baterion por la sunpaneloj kaj iu anonima donacanto helpis nin per vento-generatoro de 500 W. Krome ni tre bezonas komputilojn, digitalajn sonbendigojn, miksilojn, CD/DVD legilojn, transportilon por niaj ĵurnalistoj ktp.

ESPERANTO-KURSO PROJEKTO:

La instruado de Esperanto en la Esperanto mez-lernejo okazis malofte ĉar mi estis tro-okupita. Prefere alia homo transprenus la Esperanto-kurson, sed por tiu necesas salajro. Ni petis subtenon de la Fonduso "Esperanto Plus" kiu kolektas monon je 10 Euroj monate por subteni la instruadon de Esperanto en Afriko. Bonvolu skribi al Jean-Pierre Marcq: contact.esperanto.plus@gmail.com

Retadreso: smbmramba@yahoo.com , mazingira@kono.be , mazingiratz@gmail.com
Retpagoj: www.kono.be/mazingira , <http://www.verduloj.org/mazingira.htm>
P.O KESTO 51, BUNDA. TANZANIO

----- fino de la Raporto de Mramba Simba - iomete koncizigita de manfred - sekvos listo ---

Mazingira Salama & Ketare

Listo de la projektoj kiuj bezonas subtenon 2014 ... (kunmetita de manfred/AVE)
prezoj en Euro (iomete lau la prioritato):

- Operacii infanojn je la piedoj au kruroj (inter 200 - 400)
Se vi emas helpi infanon bonvolu kontakti Manfred Westermayer (Manfred@westermayer.de) kaj
Christiane Lamy (lamy@cegetel.net);
www.verduloj.org/maz_operacio_kruroj.pdf

- Subteni orfojn por daurigi lernadon post la tria klaso (30 jare, au 50+3* en Mezlernejo)
- Oleopremilo: 2900, jam survoje ch. 1500, do mankas 1400.
- Traktoro: 4500, minimume 2 * 1500 (por 2 malgrandaj traktoroj kun plugiloj)
- "Esperanto Secondary School" bezonas loghejon por instruistoj, laboratorion, akvo-rezervujon
- Ripari la biogaso-projekton dank al kurso kiu donis novajn sciojn: 1000
- Elektroenergio (sunpaneloj, ventogeneratoroj 2-5 kW), Christiane Lamy (lamy@cegetel.net);
- Transportilo (ambulanco) por malsanuloj: 2500
- Putoj kaj lagetoj: entute pli ol 5000

Esperanto instruisto kaj lerniloj; Esperanto Plus subtenas la Esperanot-kurson, proponas donaci
10 Eurojn monate; Jean-Pierre Marcq: contact.esperanto.plus@gmail.com
*) 3 Euroj por T-chemizo "Esperanto" por la mezlernejoj.

Kontoj:

- de AVE, che UEA: avex-z

- de FEL, konto che UEA kaj rekte:

Mazingiras Konto in der EU: Flandra Esperanto Ligo, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen
IBAN: BE66 0000 2653 3843; BIC: BPOTBEB1

- de Mramba Simba (estro de Mazingira), konto che UEA: smba-n

Adresoj:

Mazingira, P.O. Kesto 51, BUNDA, TANZANIO
smbmramba@yahoo.com , mazingiratz@gmail.com

Christiane Lamy: lamy@cegetel.net

FEL/Bart: mazingira@kono.be , www.kono.be/mazingira

AVE/Manfred: ave@verduloj.org , www.verduloj.org/mazingira.htm